



n-ro 6
merkredo
la 16-an de aŭgusto
2017

KURIERO DE INTER-FEST

Finaj vortoj

Karaj festivalanoj,

Ĉi tiu estas la lasta numero de la *Festivala folio*. La festivalo oficiale daŭris inter la 5-a kaj 12-a de aŭgusto, sed kelkaj programoj okazadis eĉ ĝis la 16-a. La lasta numero priskribas ĉefe la ekskursojn kaj la programojn okazintajn post la adiaŭo de la festivalanoj (la 12-an de aŭgusto), kaj vi certe legos ĉi tiujn vortojn estante jam hejme kaj resumante la memorojn el Bjelovar.

Ni deziras al vi akoraŭfoje danki pro via partopreno kaj helpo al nia festivalo. Ĉe la fino ni devas diri, ke la *Festivala folio* estis redaktata ĉiunokte post la okazintaj programoj, por ke la sekvan tagon vi povu legi ĝin.

La redaktan laboron plenumis la festivala sekretario **Josip Pleadin**, helpe de la bulgara samideano **Georgi Mihalkov**. La ĉefaj foto-kunlaborantoj estis **Sanja Forjan Pleskina** kaj **Berislav Rubčić**.

La kurieron ĉiumatene multobligis **Nenad Margetić** kaj faldis la membroj de Bjelovara Esperantista Societo kaj gevolontuloj el Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo.

NEFORGESEBLA EKSKURSO AL VELIKI GRĎEVAC

La 9-an de aŭgusto la partoprenantoj de INTER-FEST faris belegan ekskurson. Ni startis je la 9h00 el Bjelovar al vilaĝo Veliki Grđevac. La tago estis suna kaj agrabla, kaj ĉirkaŭ la vojo vastiĝis la belega kroata pejzaĝo. Baldaŭ ni estis en la malgranda vilaĝo, kie naskiĝis unu el la elstaraj kroataj verkistoj – **Mato Lovrak**. Nia ĉiĉeronino, s-ino **Jasna Piščević** gvidis nin al la vilaĝa lernejo, kiu havas la nomon de la verkisto. En la lernejo oni faris apartan ĉambron, en kiu estas kolektitaj memoraĵoj pri Mato Lovrak. Mi eniris la memorĉambron kun tremanta koro, meditante, ke en tiu ĉi eta vilaĝo naskiĝis talenta verkisto. En la ĉambro estas aĵoj de la verkisto, persona legitimilo, diplomoj, lia horloĝo kaj liaj libroj.

Mato Lovrak verkis librojn por infanoj. La plej famaj libroj estas *La kamaradaro de Petro Nodeto* kaj *La trajno en la neĝo*. Por ni plej gravas, ke la du libroj estas tradukitaj en Esperanton, kaj la traduklaboron faris mia samideano **Josip Pleadin**. La afabla ĉiĉeronino rakontis al ni pri la vivo de Mato Lovrak. Antaŭ la lernejo ni faris komunan foton, por ke ni ne forgesu nian viziton al tiu ĉi malgranda lernejo.

Niaj aŭtoj veturigis nin al Centro Mato Lovrak, tiu tre agrabla kaj pitoreska loko, en kiu troviĝas interesa etnografia muzeo, en la konstruaĵo de iama muelejo. La ĉiĉeronino montris al ni la muelejon, ilojn, rakontis pri la vivmaniero de la vilaĝanoj, kaj dank' al ŝiaj vortoj ni kvazaŭ revenis en la jarojn, kiam la homoj loĝis en la sino de la naturo kaj ilia vivo estis simpla, sed multe pli racia ol nia nuna kuranta vivo.

Post la muzeo sekvis tre belaj amikumaj momentoj – Esperantaj kantoj, ŝercoj kaj bongusta tagmanĝo. La organizantoj de INTER-FEST antaŭvidis ĉion, por ke nia bonhumoro ne ĉesu.

Sekvis veturado al naĝbasenoj. Tie atendis nin la suna vetero, la pura akvo kaj la gaja atmosfero inter la naĝantoj.

Kaj denove ĉirkaŭ la tablo en kafejo ni okazigis niajn agrablajn Esperanto-konversaciojn kaj ŝercojn.

La tago nerimarkeble pasis.. Kotentaj, post la agrablaj travivaĵoj kaj refreŝigoj, ni revenis al Bjelovar.

(Georgi Mihalkov)



TRA NORDOKCIDENTA KROATIO

La festivalaj ekskursoj n-ro E-4 kaj E-5 vekis la plej grandan intereson de la festivalanoj. La unua konigis al ili la regionon de Zagrebo kaj la vilaĝojn Gornja Stubica, Donja Stubica kaj Kumrovec, kaj la dua la barokan urbon Varaždin kaj la plej faman kastelon de Kroatio – Trakošćan.

La ekskurso E-4, kiu estis organizita la 10-an de aŭgusto, lerte kaj sperte gvidis la profesia Esperanta ĉiĉerono **Neven Kovačić** kaj por la E-5 estis engaĝita ĉiĉeronino **Vesna Petanjek** el Varaždin, kiu iam lernis Esperaton.

Dum la vizito al Zagrebo ni konatiĝis kun la plej gravaj urbaj vidindaĵoj: la centra parko Zrinjevac, la Jelačić-placo, la Supra urbo kun la preĝejo de Sankta Marko, la bazono Dolac kaj la zagreba katedralo. Ĉe la fino ni vizitis la tombejon Mirogoj. En la urbo oni neeviteble haltis ĉe la monumento al Stjepan Radić, la iama ministro de edukado, kiu estis esperantisto. La grupo vizitis la faman Amruševa-straton n-ro 5, kie dum duonjarcento funkciis pluraj Esperanto-societoj kaj Kroata Esperanto-Ligo. En la buso oni rakontis la vivhistorion de la Esperanta poeto Nikolao Hohlov, kiu vivis en Zagrebo kaj tie verkis sian faman poemaron *La tajdo*, el kiu oni legis la poemon *Sur Slijeme*.

Por tiu ekskurso en Zagrebo aliĝis ankaŭ tri ĉinaj kaj unu litova festivalaninoj, kaj kelkaj gesamideanoj el la fervojista societo de Zagrebo akompanis nin dum la promeno.

Paŭzon por tagmanĝo ni faris en la belega restoracio *Zelenjak* apud la rivero Sutla ĉe la kroata-slovena landlimo, post kio ni vizitis la naskiĝdomon de la iama prezidento de Jugoslavio Josip Broz Tito kaj la etnografian vilaĝon Kumrovec. Revene ni haltis en Zelenjak apud la monumento al la kroata nacia himno.

La 11-an de aŭgusto startis la ekskurso E-5, dum kiu ni vizitis la famegan tombejon de Varaždin, kiu estas aranĝita en la stilo de franca park-arkitekturo. Dum la promeno tra Varaždin ni vizitis la urban kastelon, la urbocentron kun la ĉefa placo kaj la katedralon, kaj nian viziton al tiu baroka urbo ni finis per legado de *anĝelaj mesaĝoj* en la buso, veturante al Trakošćan.

Por la tagmanĝo estis elektita tre agrabla flosanta restoracio sur la verdakva lago ĉe la piedo de la kastelo Trakošćan. Kun la kastelo kaj la historio de ĝiaj posedintoj, la nobela familio Drašković, ni konatiĝis dum unuhora grupa vizito. Poste sekvis la vizito al Gornja Stubica, kie en 1573 okazis granda kamaprana ribelo. Tie ni vizitis la monumenton starigitan memore al tiu historia evento, la lokan kastelon kaj poste ankaŭ la tilon de Matija Gubec (la kamaprana gvidanto) en la vilaĝo Donja Stubica. Kiel neplanitan parton de la ekskurso, revene ni vizitis la urbeton Ludbreg, en kiu laŭdire troviĝas la centro de la mondo. Ni volonte fotiĝis en tiu loko, markita per metala tabulo.

Fotis
Sanja Forjan Pleskina



Ekskurso E-5



LA LASTAJ VIBROJ ...



Kiel malfrua eĥo de INTER-FEST, okazis kelkaj publikaj programoj, organizitaj de la korea artisto-pentristo Ho Song. Temis pri malgranda kurseto de portretado kaj skribado de koreaj literoj, kiuj okazis en la urba parko. Grupeto da plej kuraĝaj geesperantistoj klopodis portreti sian samsocietanon, en kiu helpadis ilin la artisto, klarigante la kaŝitajn misterojn de portretado. Oni uzis la teknikon de karbodesegnado sur papero. Tiuj programoj altiris nemalgrandan atenton de la pretarpasantaj Bjelovaranoj. Sed la plej grandan atenton certe kaŭzis, kiam la artisto mem portretis.



Neimageble kaj neatendeble grandan atenton al la festivalo donis la gazetaro, radio kaj televido, kiuj raportis de tago al tago, per specialaj elsendoj aŭ intervjuoj. Ni ankoraŭ kompletigas la liston de raportoj, sed jam nun klaras, ke INTER-FEST estis la plej granda Esperanto-evento en Kroatio ĉi-jare.

Se vi raportos pri INTER-FEST en via landa aŭ Esperanta gazetaro, bonvolu informi nin pri tio, indikante la datojn kaj gazet-titolojn aŭ sendante kopiojn de koncernaj artikoloj al:

esperanto.bjelovar@gmail.com

Jen violonoj de Dédé kaj Fransoaz' –
Ja inda kaj unika bonokaz'
Por memorfiksi l' ĉarmajn bildojn de Ho Song
Ĉe l' ĉarmaj ondoj de l' muzika son'.
Jen la kroata lingvo, parolata kun elan'
Dum lingvokurso de kursan'-alilandan'.
Kaj jen prezentas Israel' kaj Bulgari'
La novajn librojn, alireblajn nun por ni.
Do vere mankis tempo por libera vag'
En multeventa, riĉa kvara tag'.



Do jen – ripozo super ĉio!
Hodiaŭ venas la defio
Por proksimiĝi kaj amiki,
Por kune gaje ekpikniki.
Do estas vere multo nova
En la lernejo Mato Lovrak,
Des pli en la muzea sfero –
Eĉ la gladilo el gisfero!
Liberas plene spiro brusta,
Kaj pico estas pli bongusta
En la natur', en paca ombro,
En la amika kanta rondo,
Kiu alvenos al kulmino
En akvo de l' basena sino.
Jes, ĝuo ŝajnas jam surfina
Ĉe l' jublad' de l' tago kvina.

(Mikaelo Bronŝtejn)

